


NE FORGESU, KE NIA TURISMA CENTRO DEVAS SERVI ANKAŬ POR NIAJ INFANOJ!

1984·4·103

# starto

KOVOVÉ
METALAJ REMIZOJ
GARÁŽE

el ŝtala lado - fundamenta farbotavolo - duparta pordego - deklina tegmento - sen planko - facila muntado aŭ sur submuro aŭ sur ebena tereno

Longo 4400 mm - prezo 4840,-Kčs
Longo 5300 mm - prezo 5350,-Kčs
Longo 6200 mm - prezo 5830,-Kčs
Larĝo 3030 mm alto 2450 mm estas egalaj ĉe ĉiuj tri tipoj.

Je mendo fabrikas kaj dum malonga tempo 1-2 monatoj liveras

INKLEMO
PRAHA (kooperativo)

Skribajn mendojn sendu al la adreso de komerca fako: INKLEMO PRAHA, maloobchodní úsek, 190 00 PRAHA 9, Spojovací 11, aŭ telefonu al n-ro 83 09 49. Persone mendeblaj en Pragaj vendejoj de la kooperativo. Transporton ni povas certigi. Remizojn ni liveras nur al privatuloj.

# Karl Marx kaj Friedrich Engels

Tamen, oni skribis pri ĝi kaj publikiĝis projektojn. Laŭ DULIČENKO /1982, 289/ ĝis 1900 jam estis aperintaj ĉirkaŭ 340 projektoj de pazigrafioj aŭ pazilalioj /= planlingvoj/ 7/. Al tiuj i.a. apartenas la iom pli konataj Solresol /SUDRE, 1866/, la pazigrafioj de BACHMEIER /1852/, DAMM /1876/, la Universalsprache de PIRRO /1868/ kaj, ne laste Volapük de J. M. SCHLEYER, kiu publikiĝis 1879, kaj aparte pri Volapük oni multon skribis. Marx jam mortis 1883, do eble ne plu rimarkis la fortiĝantan propagandon pri Volapük. Engels vivis ĝis 1895. En la jaroj 1884, 1887 kaj 1889 okazis Volapükkongresoj /Friedrichshafen, München, Paris/. 1887 aperis Esperanto. Pri Volapük aparte kaj pri Esperanto sole nur Engels povis ion scii, almenaŭ teorie. Sed en la verkoj de Marx kaj Engels nenie oni trovas eĉ la vortojn Volapük aŭ Esperanto.

Tamen ni konkludu, la problemo de universala aŭ internacia lingvo principe povis esti konata al Marx kaj Engels.

3. MARX KAJ ENGELS PRI LA PROBLEMO DE LINGVA KOMUNIKADO

Engels komprenis multajn lingvojn. 1839 li skribis: "Bei der Gelegenheit hab' ich Türkisch und Japanisch gelernt und verstehe somit 25 Sprachen! /MESSÜ, 571/ 8/. Ĉe tiu okazo mi lernis la turkan kaj la japanan kaj tiel komprenas 25 lingvojn! Kaj li ankaŭ aparte mencias la neceson daŭre lerni pligrandigantan nombron de fremdaj lingvoj kaj skribas 1893:" Die Ansprüche der Internationalität wachsen mit jedem Jahr. Bis 1848 konnte man glauben, genug getan zu haben, wenn man die Hauptsprachen von West- und Zentraleuropa einigermassen verstand, aber nun ist es dahin gekommen, dass ich auf meine alten Tage sogar noch Rumänisch und Bulgarisch lernen muss, wenn ich dem Vormarsch des Sozialismus nach Osten und Südosten folgen will ... Es hat mich sehr gefreut, Plechanows Arbeiten bulgarisch übersetzt zu sehen". /MESSÜ, 563. La postuloj de la internacieco kreskas kun ĉiu jaro. Ĝis 1848 oni povis kredi esti farinta sufiĉe, se oni pli malpli komprenis la ĉefajn lingvojn de Okcidenta kaj Centra Eŭropo, sed nun la aferoj evoluis tiel, ke mi en mia granda aĝo eĉ devas lerni ankoraŭ la rumanan kaj bulgaran, se mi volas sekvi la antaŭenmarŝon de la socialismo al oriento kaj sudoriento ... Mi ĝojis vidi tradukitaj bulgaren la laborojn de Pleĥanov/.

Kaj aliloke Engels mencias, /1885/ ke la lingvolernado estas pena: "Ich lese Russisch ziemlich mühelos, wenn ich mich eine Woche damit beschäftigt habe. Aber manchmal kann ich das ein halbes Jahr lang nicht, dann verliere ich die Übung und bin gezwungen, es gewissermassen von neuem zu lernen" /MESSÜ, 579: Mi sufiĉe senpene legas la rusan, se mi okupiĝis pri ĝi dum unu semajno. Sed foje mi tion dum duona jaro ne povas fari, tiam mi perdas la praktikon kaj estas devigita, eklerni ĝin kvazaŭ denove/.

Interesa estas la konstato de Engels pri la malkoniga efiko de lingva izoliteco. 1874 li skribas: "Eine Menge befremdlicher Erscheinungen in der bisherigen russischen Bewegung erklären sich daraus, dass lange Zeit jede russische Schrift dem Westen ein Buch mit sieben Siegeln war und dass es daher den

Bakunin und Konsorten leicht wurde, ihr unter den Russen längst bekanntes Treiben dem Westen zu verbergen. Mit Eifer verbreiten sie die Behauptung, selbst die Schmutzseiten der russischen Bewegung müssten - im Interesse der Bewegung selbst - dem Westen verheimlicht werden; wer Russisches soweit es unangenehmer Natur war, dem übrigen Europa mitteilte, der sei ein Verräter. Das hat jetzt aufgehört. Die Kenntnis der russischen Sprache... ist wenigstens unter den deutschen Sozialdemokraten keine so grosse Seltenheit mehr. Die Russen werden sich in das unvermeidliche internationale Schicksal fügen müssen, dass ihre Bewegung fortan unter den Augen und der Kontrolle des übrigen Europas vor sich geht. Niemand hat die frühere Abgeschlossenheit so schwer zu büssen gehabt wie sie selbst. Ohne diese Abgeschlossenheit hätten sie nie jahrelang so schmählich beschwindelt werden können, wie dies von Bakunin und Konsorten geschah." /MESSÜ, 564: Amaso da malagrablaj fenomenoj en la ĝisnuna rusa movado estas klarigebla per tio, ke ĉiu rusa verko en la okcidento estis dum longa tempo libro nebeĉifrebla - ein Buch mit sieben Siegeln - kaj tial estis facile al Bakunin kaj kompanio kaŝi al la okcidento sian agadon, kiu jam longe estis konata inter la rusoj. Kun fervoro ili disvastigis la aserton, ke eĉ la aĉaj flankoj de la rusa movado devus esti kaŝataj antaŭ la okcidento, en la intereso de la movado mem, kiu komunikis al la cetera Eŭropo iun ruslingvaĵon, se temis pri malagrablaĵo, tiu estis perfidulo. Tio nun cesis. La scipovo de la rusa lingvo ... almenaŭ inter la germanaj socialdemokratoj ne plu estas granda maloftaĵo. La rusoj devas akcepti la neeviteblan internacian sorton, ke ekde nun ilia movado evoluos sub la okuloj kaj kontrolo de la cetera Eŭropo. Neniu devis tiom peze penti la antaŭan izolitecon kiel ili mem. Sen tiu izoliteco ili ne povintus esti tiel fie trompitaj dum jaroj, kiel tio okazis flanke de Bakunin kaj kompanio/.

6/ RUSCHINSKI, H./RETZLAFF-KRESSE, B. /1974, Red./: Karl Marx, Friedrich Engels. Über Sprache, Stil und Übersetzung. Berlin /Dietz/
kaj ekzistas indekso al la verko:
STEFFENS, D./WOLF, B. /1977/: Sachregister zu dem Sammelband Karl Marx und Friedrich Engels. Über Sprache,Stil und Übersetzung /Berlin 1974/. Sprachwissenschaftliche Informationen, 2/77, Sonderheft, Akademie der Wissenschafter der DDR, Zentralinstitut für Sprachwissenschaft, Berlin.

7/ DULIĈENKO, A. /1982/: Interlingvistika minevikust ja tänapäevast - En: Keel ja kirjandus, Tallinn, XXV, n-ro 6, p. 288 - 294.

8/ Ni mallongigas la sub 6/ cititan verkon laŭ la komencaj literoj de la titoloj: MESSÜ /Marx, Engels über Sprache,Stil und Übersetzung/.

/Daŭrigo./





# A L V O K O

por aktive partopreni preparon de la tutŝtata ekspozicio
E S P E R A N T O 1 8 8 7 - 1 9 8 7
CENT JAROJ DE LA BATALO POR INTERKOMPRENIĜO KAJ MONDPACO

Al ĉiuj lokaj grupoj de ĈEA;
al ĉiuj komisionoj kaj sekcioj de ĈEA;
al ĉiuj spertaj amatoraj kaj profesiaj fotografistoj en nia membraro!

Estimataj geamikoj,

multaj el ni ankoraŭ ĝuas impresojn el sukcesa renkontiĝo de esperantistoj-pacdefendantoj en Pardubice, okazinta en marto 1984. Al ĝiaj sendisputeblaj sukcesoj ankaŭ apartenis bela medio, substrekita per la ekspozicioj "Hiroŝima-Nagasaki" /realigo: propag.fako de la Maŝinfabriko de Mueliloj Pardubice /; kontraŭmilitaj desegnaĵoj de Pavel RAK /realigo: KPI ĈEA/; eldonagado de ĈEA /realigo: KPI ĈEA/. Al tiuj ĉi ekspozicioj ankaŭ viciĝis tiu pri la 15-jara jubileo de ĈEA /projekto: KPI ĈEA, realigo: propag.fako de Hoteloj kaj Restoracioj Karlovy Vary/.

Vizitintoj de la lasta ekspozicio certe rimarkis, ke ĝia enkonduko estis jam dediĉita al la 100-jara jubileo de la estiĝo de Esperanto en 1987. La UEA-estraro ege signifas la inform-ekspoziciojn instalotajn dum la periodo 1983 - 1987 kaj speciale tiujn preparatajn por la jubilea jaro. La komisiono de ĈEA por preso kaj informado tial decidiĝis plivastigi la pretan ekspozicion pri la 15-jara jubileo de ĈEA je pluraj 25 paneloj /130 x 40 kaj 130 x 50 cm/ kaj kunligi la tutan enhavon por la temo "100 jaroj de Esperanto - 100 jaroj de la batalo por interkompreniĝo kaj mondpaco".

Ĉar la komisiono de ĈEA por preso kaj informado - la ĉefa realiganto de la ekspozicio - ĝis nun ne disponas per sufiĉa fototeko kaj ĉar la ĉefa elemento de la inform-ekspozicio ĝuste estas la DOKUMENTAJ FOTOGRAFAĴOJ, ni petas ĉiujn instituciojn de ĈEA eksendadi al ni tuj post publikigo de tiu ĉi alvoko la fotografaĵojn el sia pasinta kaj nuntempa agado. Dokumentante ĉiun agadon en 1984 - 1987 elektu fotografaĵojn por la tutŝtata ekspozicio kaj sendu ilin portempe al ni. Kompreneble ni akceptas ankaŭ la historiajn fotografaĵojn - ekzample fotokopiaĵojn - same la fotokopiaĵojn de la historiaj aktoj, faksimilojn de la historiaj dokumentoj, titoloj de origina Esperanto-literaturo, vortaroj, lernolibroj, propagandaj flugfolioj kaj afiŝoj /en malgrandigita formato aŭ formo - vidu pli malsupre/. Historiaj presaĵoj - se vi povas ilin perdi laŭforme - estas dankeme akceptotaj supoze de bona teĥnika stato/neŝiritaj kaj sur la papero kapabla por gluo/. TEMAS PRI ORIGINALAĴOJ!

TEĤNIKAJ NECESAĴOJ: Unuopaj fotografaĵoj /sufiĉas nigro - blankaj/, materialo: duonkartono, laŭgrande de bildkartoj aŭ MAKSIMUME 13 x 18 cm. La pli grandaj kopiaĵoj estas akceptotaj

sole en limigita nombro kaj post antaŭa konsultiĝo kun la komisiono. Ankaŭ la fotografiajn seriojn bonvolu sendi CERTE NESURGLUITAJN kaj SEN PASPARTO! NE PROVU TIEL KREI MEM LA EKSPOZICION, VI PLIFACILIGOS LABORON DE TIES AŬTOROJ! Dorsflanke de ĉiu fotografaĵo skribu PER MOLA KRAJONO la jaron, nomon de la aranĝo, eventualan pluan tekston, nomon kaj adreson de la aŭtoro. KONSERVU VICIĜON DE LA INDIKOJ!

La fotografaĵoj estas sendotaj ĜIS 1986.09.30 /sed ne lasu tion por la lasta momento!/ al la komisionestro: Jaroslav KLEMENT, Kpt. Nálepky 7, 360 04 KARLOVY VARY - BOHATICE. Telefono: Karlovy Vary 226 30 dum labortagoj 07,30 - 16,00 horo de MET.

Por via komplezo kaj helpo anticipe dankas

J. K l e m e n t ,
komisionestro.

---

## EFIKOJ DE EKSTERA INFORMADO PRI ESPERANTO

Denove ni rekomendas por via atento jenajn artikolojn el la lastaj numeroj de la revuo ESPERANTO. Nian informon eblas nomi per plilarĝigita titolo el la decembra numero de ESPERANTO - Efikoj de ekstera informado pri Esperanto el alia flanko kaj per fremdaj manoj:

n-ro 935 /11-1983/, pĝ. 181: "Laborplano de UEA por la periodo 1983 - 1987" /pri la prioritatoj antaŭ preparo de la aranĝoj antaŭ la jubilea jaro de Esperanto 1987/;

n-ro 936 /12-1983/, pĝ. 201: "Aliaj faras tion pli bone kaj senpage" /tre grava instruo, kiel fari propagandon kaj informi pri Esperanto "per fremdaj manoj"/;

n-ro 937 /1-1984/, pĝ. 5: "Esperanto kaj komputila tradukado" /ne nur por la fakuloj de la komputila teĥniko/; pĝ.8: "Verkistoj organiziĝas" /de Jiří Karen/;

n-ro 938 /2-1984/, pĝ. 21 - 23: "Parizo liveras modelojn por sukcesa agado" /speciale la lasta alineo pri moderna aspekto de la propagandaĵoj - grava teĥnike konceptita alvoko al aŭtoroj kaj grafikistoj por prepari allogajn propagandaĵojn/; pĝ. 23 - 24: "Novstila publika elpaŝo en Svedio" - la artikolon mi speciale rekomendas al ĉiuj aktivuloj en la MEM-agado. La aŭtoro R. LINDBLOM laŭvorte diras: "...la intereso por paco furoris same en Svedio kiel en aliaj landoj dum la lasta jaro. Ni volis utiligi tiun intereson, ligante ĝin al lingvaj demandoj." Pli ol tridek jarojn ni parolas pri tio, ke Esperanto servas al la mondpaco. En la artikolo videblas, kiel la pacagado povas ankaŭ inverse servi al Esperanto. Agu, propagandistoj!

-jkt-

---



# KIA ESTAS U.N.?

El lastatempaj eldonaĵoj de la Unuiĝinta Naciaro, t. e. la por-amaskomunikila informilo de 1983-11 kaj "Sekretariejaj novaĵoj" de 1984-01-31, kiujn nia UN-Placa Oficejo sendis al ni, ni ĉerpu plurajn fragmentojn por koncepti kia estas UN.

ESTEJO DE UN, NOVJORKO

En 1945-12-10 la Kongreso de Usono unuanime decidis inviti UNn establi sian oficejon en Usono. En 1946-02-14 la Ĝenerala Asembleo de UN en Londono decidis loki UNn apud Novjorkon. En 1946-12-14 la Ĝenerala Asembleo per sia plimulto akceptis la donacon de 8,5 milionoj da dolaroj de sro Ĝon D. Rokfelr Juna /John D. Rockfeller, Jr./ por aĉeti la nunan terenon. La mankantan parton donacis la urbo Novjorko. La UN-Placo estas internacia enklavo en Usono, do ne usona teritorio.

ŜTATOJ-MEMBROJ

La nombro de la ŝtatoj-membroj estas nuntempe 158. Ili sendas pli ol 2900 homojn al la Ĝenerala Asembleo ĉiujare.

OFICISTARO

En la ĉefoficejo de UN en Novjorko laboras 5095 kaj en la tuta mondo pli ol 16000 el 150 landoj.

VIZITANTOJ

Tage meze 1523 homoj. Ĝis nun vizitis pli ol 25 milionoj da homoj, kiujn oni gvidis en pli ol 25 lingvoj.

KONSTRUAĴO

En la ĉefoficejo la oficistoj povas elekti el la 12 temperaturaj varioj por sia ĉambro. Elektraj transportiloj rapidigas la movon de dokumentoj kaj poŝtaĵoj tra la konstruaĵo. En la asemblejo estas seĝoj por 182 landaj delegitaroj, ĉiu po 6 seĝoj, kaj por aliaj homoj; 2103 seĝoj kun kapaŭdilo.

LINGVOJ

La oficialaj laborlingvoj de la oficistaro estas la angla kaj franca. /En la regionaj oficejoj aldoniĝas lingvo araba, hispana aŭ rusa./

La lingvoj de la Ĝenerala Asembleo kaj gravaj organoj estas: angla, araba, ĉina, franca, hispana kaj rusa.

La radioprogramoj de UN estas dissendataj en 25 lingvoj al 167 landoj kaj teritorioj.

La nombro de la paper-tradukistoj-oficistoj estas 370 kaj tiu de la buŝtradukistoj 193. Laŭkaze laboras eksteraj tradukistoj.

ILOJ

Proksimume 5000 tajpiloj estas uzataj, kiuj ebligas tajpi ĉiujn 6 lingvojn de UN.

Lastatempe Kanado donacis al UN komputilan finstacion, kiu ebligas rektan kontakton kun la informabanko ĉe la Kanada Traduka Oficejo en OTAŬO.

BUĜETO

La buĝeto de UN en komparo kun tiu de la usona federa registaro en milionoj da dolaroj:

| | UN | Usono |
|---|---|---|
| 1978 | 500 | 461 000 |
| 1981 | 683 | 695 000 |
| kresko | 37% | 51% |

"La buĝeto de UN estas malpli granda, ol tiu de la Polica Fako de la urbo Novjorko. La mono, kiun la mondo elspezas jare por armado, povus kovri ĉiujn elspezojn de la tuta UN-

familio dum pli ol jarcento. Sveda ambasadoro ĉe UN atentigis, ke financi la regulan bugeton de UN ne kostus pli ol la prezo de 7 bombaviadiloj.Li atentigis ankaŭ, ke la nutraĵoj por hundoj kaj katoj, aĉetitaj en usonaj memservaj butikoj en 1979, kostis 3,2 bilionojn da dolaroj - pli ol 6 oblojn de la jara elspezaro de UN."

KIU PAGAS POR UN ?

La ŝtatoj-membroj devas pagi por la regula buĝeto de UN, kiu asignas difinitan elcentaĵon al ĉiu lando. La elcentaĵo varias inter la minimuma 0,01% kaj la maksimumo de 25%.La elcentaĵo estas bazita sur la "kapablo pagi".

La plej multe pagantaj 10 landoj estas:

| | |
|---|---|
| Usono | 25,00% |
| Sovetunio | 10,54% |
| Japanujo | 10,32% |
| F.R.Germanujo | 8,54% |
| Francujo | 6,51% |
| Britujo | 4,67% |
| Italujo | 3,75% |
| Kanado | 3,08% |
| Hispanujo | 1,93% |
| Nederlando | 1,78% |

Tiuj 10 landoj pagas kune 76 elcentojn de la regula buĝeto.

Aldone al la asignita sumo, nombro da landoj faras libervolan pagon al UN. En 1980 la sumo de la asignitaj kotizoj por la tuta UN-familio estis 1,4 bilionoj da dolaroj kaj la sumo pagita libervole estis 2.4 bilionoj.

---

## L I N G V I S T I K O   K A J   E S P E R A N T I S T O J

I.

Ĉar ni esperantistoj volas influi la lingvan evoluon de la homaro, estas necese, ke ni sciu almenaŭ la fundamentojn de la ĝenerala lingvistiko, alie neniu kredos nian argumentadon - same kiel ni mem ne kredus al la adeptoj de nova matematika skolo, se ili elmontrus nescion de la bazaj matematikaj operacioj. Kaj same kiel matematikisto ne povas klarigi siajn novajn teoriojn al laikoj, ne kapablaj lin kompreni, ankaŭ nia priesperanta informado ofte vane klopodas trabati la muron de nesciencaj, subjektivismaj antaŭjuĝoj, per kiuj la publiko kirasas sin. Tial ni devas ne nur argumenti pri la internacia lingvo, sed propagandi ankaŭ la evoluprincipojn de la homa lingvo ĝenerale, ĉar nur tiam la publiko komprenos la kernon de la problemo kaj ne disputos pri bagatelaĵoj, kiuj nur "ŝajnas" gravaj.

El la diritaj motivoj rezultas, ke la fundamentoj de la lingvoscienco devas iĝi nedisigebla parto de la instruado pri la historio kaj literaturo de Esperanto. Ĉar ĝis nun tiel ne okazis, la jena artikolo provos plenigi la truon per almenaŭ baza informo.

La scienco, kiu pritraktas la lingvojn en la formoj parola kaj skriba, nuntempa, historia kaj antaŭhistoria, nomiĝas lingvistiko, dum la filologioj interesiĝas nur pri la skriba formo kaj ankaŭ la literaturo de iu konkreta lingvo / anglistiko, francistiko, rusistiko, esperantologio ktp./. En la mondo ek-



zistas 3 ĝis 5 mil lingvoj kaj ĉiujn la moderna lingvistiko opinias samkvalitaj, kvankam ne ĉiuj estas same evoluintaj kaj tralaboritaj - ĉiu vivanta lingvo nome estas senĉese adaptata kaj aktualigata fare de siaj uzantoj laŭ iliaj komunikaj bezonoj, tial estas nur afero de tempo, kiam eĉ la plej primitiva lingvo atingos la nivelon de la plej kulturita. La laika taksado de lingvoj laŭ la estetika vidpunkto /certa lingvo "plaĉas" aŭ "malplaĉas"/ estas subjektivisma, snobisma kaj nescienca. Al la lingvoj oni ne rajtas aljuĝi kvalitojn, kiujn povas havi sole konkretaj tekstoj /artikolo restos same scienca, oni esprimu ĝin en kiu ajn lingvo de la mondo/.

Esperanto estas la plej viva kaj sukcesa artefarita lingvo ne pro iaj pli grandaj sciencaj aŭ estetikaj kvalitoj, sed ĉar ĝia skema reguleco ebligas al ĉiuj ĝiaj uzantoj, ke ili - senĉese kreante novajn vortojn - adaptadu kaj aktualigadu ĝin simile kiel siajn gepatrajn lingvojn, kvankam Esperanto estas por ĉiuj homoj lingvo fremda.

Parolo estas kapablo de homo elbuŝigi artikulaciitajn sonojn, dum lingvo estas sistemo de sonsignoj /vortoj/. Krei tian sistemon kapablas nur pensanta estulo kaj pensi ne eblas sen vortoj, tial estas klare, ke la parolo, lingvo kaj pensado estiĝis samtempe, iam en la praepoko. La parolo ne formiĝis en la naturo, ĝi estas produkto de la homa socio; komence kreis la lingvojn nur primitivaj analfabetoj, sur pli altaj evoluŝtupoj tralaboris ilin ankaŭ la literaturistoj kaj lingvistoj, sed ĝis nun neniu vivanta kaj kultura lingvo povas progresi sen aktiva kunlaboro de lingvaj amatoroj. La t.n. natureco kaj artefariteco de lingvoj estas en la realo nur diversaj proporcioj de spontaneco kaj celkonscieco dum la lingva evoluo.

Ĝis nun la scienco ne scias, ĉu la parolo estiĝis en unu aŭ en pluraj lokoj sur la Tero /la problemo de monogenezo kaj poligenezo/. La antropologoj asertas, ke la tuta homaro havas komunan originon kaj tial la pensado, parolo kaj lingvoj devas havi nur unu fonton. Sed la praepoko daŭris kelkajn dekmilojn da jaroj, dum kiuj la homaro disfalis en plurajn rasojn,en multegajn hordojn kaj tribojn, kaj tial ankaŭ la lingvoj tiom disfaladis, ke nun ne eblas diri, ĉu ili havis sole unu komunan pralingvon aŭ plurajn. Kun certeco ni scias nur tion, ke je la komenco de la historia epoko estis la situacio poligeneza /multegaj lingvoj/. La lingvoj estas influataj de du kontraŭaj tendencoj, disiga kaj kuniga. La obstakloj de la naturo kiel maroj, riveroj, montaroj, dezertoj, grandaj distancoj, ŝtatlimoj k. s. efikas je lingvoj disige, dum kulturaj kaj komercaj kontaktoj kaj kunlaboroj kunige.

En la pasinteco tre ofte militoj kaŭzis, ke la lingvoj de la venkintoj kaj venkitoj konglomeriĝis en unu novan, pli riĉan lingvon kun nova gramatiko kaj nova prononcado; en tia lingvo ĉiam senteblas, ke unu el la originaj lingvoj havis pli grandan influon ol la alia /ne ĉiam la pli forta kaj pli kulturita estis la lingvo de la venkintoj/. Ekzemple la latinidaj lingvoj /itala, franca, hispana ktp./ formiĝis el latinaj dialektoj, kiuj absorbis lokajn lingvojn /ĝermanajn, keltajn,slavajn k. a./ kaj estis fare de ili modifitaj. Do la latino disfalis, sed samtempe lingve uniformigis grandan parton de Eŭro-

po per kelkaj tre parencaj lingvoj.

Dum la homa historio la hordoj kuniĝadis en gentojn, tiuj en popolojn kaj tiuj en naciojn. Samtempe estiĝas novaj gentaj, popolaj kaj naciaj lingvoj, dum la antaŭaj lingvoj malaperas. La nuntempaj dialektoj de naciaj lingvoj estas postrestoj de iamaj gentaj kaj popolaj lingvoj. La naciaj lingvoj formiĝas plej ofte surbaze de la dialekto de la ĉefurbo, kiu havas ordinare la plej fortan kulturon, sed la tutnacia lingvo koincidas kun neniu dialekto. En tiu tutnacia lingvo verkas verkistoj, uzas ĝin televido, radiostacioj, gazetaro, ĝi estas instruata en lernejoj kaj ĝia iom vulgarigita varianto elpuŝas iom-postiom la dialektojn eĉ el la ĉiutaga vivo. Kelkaj lingvoj /angla, franca, hispana, araba k. a./ iĝis plurnaciaj. La ĉiam kreskanta internacia kunlaboro proksimigas la lingvojn kaj iliajn vortprovizojn /nun ekzistas ĉirkaŭ 100 000 internaciaj vortoj/, kio kaŭzis ekeston de multaj projektoj de internacia lingvo.

/Daŭrigota./

---

La 7-a ITREE' 84 en Johanngeorgenstadt sukcese pasis -


# BONVENON EN KARLOVY VARY EN 1985 !

Ekde la 10-a ĝis 14-a de majo 1984 okazis tradicia Internacia Turisma Renkontiĝo de Esperantistoj en Ercmontaro - nunjare organizita far Esperanto-Asocio de Kulturligo de GDR en fama sportcentro Johanngeorgenstadt. Pli ol 70 partoprenantoj el kvin landoj dum kvar piedekskursoj konatiĝis kun belega naturo de Ercmontaro, kun laboro kaj vivo de tieaj loĝantoj. El Johanngeorgenstadt estis sendita grava pacrezolucio emfazanta rolon de nuntempa vasta pacmovado kaj subtenanta tutmondan rezististon kontraŭ la vetarmado en Eŭropo. Dum la kultura vespero la partoprenantoj konatiĝis kun popola arto en germana parto de Ercmontaro - speciale reprezentata far knabina kanthoro "Ercmontaraj Najtingaloj". Same ni admiris majstrecon de Ercmontaraj popolaj lignogravuristoj. La renkontiĝo tiel denove pruvis gravan rolon de Esperanto por kultura alproksimiĝo de la nacioj.

Por la jubilea jaro 1985 - 40-jara jubileo de liberigo de Ĉeĥoslovakio el sub faŝisma jugo - la tasko prepari la 8 - an Internacian Turisman Renkontiĝon de Esperantistoj en Ercmontaro denove venos sur ŝultrojn de la loka grupo de ĈEA en Karlovy Vary. La renkontiĝo "ITREE' 85" okazos ekde la 17-a ĝis 21-a de junio 1985 rekte en mondfama banejurbo Karlovy Vary - en hotelo "BESEDA" en kvartalo Doubí. El tiu ĉi bazo la partoprenontoj ekskursos al LOKET, mezepoka politika centro de la regiono kun aro da memorindaĵoj. Aliaj ekskursoj gvidos nin al karlovaraj naturbelaĵoj /Belvidejoj de Karolo la IV-a kaj de Gottwald, Anĝelmonto, Monto de Vítek/ kaj al promenoj en banlokaj forest-parkoj /Diana, Linhart, Cerva Salto kaj aliaj/.

Proksimuma prezo restas la sama kiel en la jaro 1983: Kčs 500,-- por enlandanoj kaj Kčs 550,-- por eksterlandanoj. La prospekto kun aliĝiloj estos dissendata dum novembro 1984: sed la neatendemaj interesuloj povas jam nun antaŭmendi sian restadon je la adreso: Jaroslav KLEMENT, Kpt. Nálepky 7, CS 360 04 KARLOVY VARY - Bohatice. VENU DENOVE MANIFESTI POR LA MONDPACO - ĜIS LA REVIDO EN ERCMONTARO EN 1985!

-jkt-



## el junulara vivo

VIŠŇOVÁ 1984.06.22/24

Ĉu vi partoprenis la 1-an neoficialan renkontiĝon de junularo en VIŠŇOVÁ ĉe KŘIVOKLÁT, ĈSSR? Se ne, vi povas nur bedaŭri.

S-ano Jan NAVRÁTIL preparis programon kaj certigis ne nur ĉeeston de ĉeĥaj, slovakaj kaj germanaj geesperantistoj, sed ankaŭ multan nombron de simpatiantoj kaj scivoluloj. Dank' al lia aktiveco ni povis akcepti novajn geamikojn, eble estontajn gesamideanojn. Kun ili ni konatiĝis dum la unua vespero, kiam ĉiu diris kelke da frazoj pri si kaj pri sia rilato al nia movado, aŭ ĉeĥe aŭ Esperanto.

Malgraŭ la vetero malvarmiĝis, tamen regis ĝoja amuzo, mankis nek tendarfajro nek gitaro kaj ĝojkantoj. Sabaton plenumiĝis ekskurso al burgo KŘIVOKLÁT, kie ni sukcesis ankaŭ trarigardi belegan ekspozicion de historiaj ludiloj. Ne gravis, ke ni estis pluvmalsekigitaj; antaŭvespere ni havis ankoraŭ sufiĉe da vortoj por konkursoj.

Kaj venis dimanĉo - adiaŭa tago, la tago de forveturoj kaj promesoj, kie ni denove revidos. Ni promesis renkontiĝi dum la ferioj en BOR ĉe TACHOV kaj postsomere en ŽĎÁR N. SÁZ.

Ankoraŭ unufoje dankon al amiko Jan NAVRÁTIL el Teplice, kiu prizorgis al ni ĉiujn tri agrablajn tagojn.

-SAN-

---

## el leterkesto

KLUBO TUTMONDA AMIKECO

Al ĉiuj membroj
de la Esperanto-societoj kaj
Esperanto-Asocioj tutmonde!

La 23-an de majo 1984

Karaj gesamideanoj,

la 12-an de marto 1984 kun afabla permeso de la lernejestro s-ro Gaetano GRECH fondiĝis en nia lernejo "KLUBO TUTMONDA AMIKECO". Ĉiutage dum la meztaga paŭzo mi instruas la internacian lingvon al tiuj



KURACA SANATORIO J. FUČÍK
TEPLICE v Čechách

NOVA KURACA DOMO PRO MALSANOJ
DE LA MOVEBLAJ ORGANAROJ

INFORMOJ SENDOS KAJ CERTIGOS
KURACADON

BALNEA, reprezentace českosloven-
ských lázní a zřídel,

BALNEA

110 01 Praha 1, Pařížská 11, tel.: 263777, telex: 122 215

Produkta kooperativo ZNAK Hradec Králové aĉetas jenajn plumarspecojn:

plumaron de ora fazano
plumaron de perdriko
plumaron de numido
kokajn kurtenetojn surkolajn

Prezo de plumaro estos fiksita post la unira kontrolo en la produkta kooperativo ZNAK Hradec Králové. La aĉetsumon ni sendas perpoŝte. Plumaron sendu lau la adreso.

ZNAK výrobní družstvo,
Pražská 686/501 01 Hradec Králové

ČESKÝ
ESPERANTSKÝ
SVAZ
JILSKÁ 10
PRAHA 1

1 1 0 0 1

## P E D A G O G I A   S E M I N A R I O   E N   L A N Ĉ O V

Inter la 29-a de junio kaj 1-a de julio 1984 aranĝis Pedagogia sekcio de ĈEA seminarion, kies enhavo koncernis instruadon de Esperanto. Ĉefan referaĵon prelegis s-ano Marin BACEV el Bulgario. Li parolis pri problemoj de metodiko de Esperanto, pri diversaj instrumetodoj, ekzemple pri rekta metodo kaj sugestopedio. S-ano POLENSKÝ prelegis pri didaktiko de Esperanto-lecionoj, pri motivigo de lernantoj, didaktikaj ludoj ktp. S-ano SPITZ prezentis postulojn pri modela lernolibro kaj modernigo de instruprocedo, s-ano VONDROUŠEK parolis pri personeco de Esperanto-instruisto kaj pri propagado. Referaĵo de s-ano MALOVEC enhavis informojn pri esperantismo kaj ĝia rilato al lernado de Esperanto, pri neceso koni fundamentojn de lingvistiko kaj traduko. Fine estis laŭtlegita kontribuo de s-ano RÝZNAR pri instrumetodoj. Materialoj el la seminario estos prilaboritaj kaj publikigitaj.

Sekve okazis konferenco de pedagogia sekcio, kiu elektis novan estraron. Prezidantino estas d-rino Věra BARANDOVSKÁ, profesia instruistino, kiu gvidos sekcion fake. Vicprezidanto Miroslav MALOVEC zorgos pri organiza laboro, interkluboj kaj supervido de instrulaboro de esperantistoj. Sekretario de sekcio estas d-ro Vladimír ŠKODA. Komitatano d-ro Jaroslav POLENSKÝ preparos instrumaterialon. Komitatanino Pavla JODASOVÁ gvidos pedagogian rubrikon en STARTO kaj registradon de membroj.

Pedagogia sekcio petas ĉiujn membrojn de ĈEA, kiuj instruas Esperanton, preparas lernilojn kaj praktikas ian pedagogian agadon, aŭ estas profesiaj instruistoj, ke ili aliĝu al pedagogia sekcio. Aliĝilon bonvolu sendi al s-anino Pavla JODASOVÁ, V Štíhlách 1318, 142 00 PRAHA 4 - Krč. Pri tio ni petas ĉiujn, ĉiujn eĉ malnovajn membrojn /temas pri komputa prilaboro/. Instruistoj de Esperanto reprezentas nian asocion, tial estas malprudenta pedagogie aktivi ekster la sekcio!

--------------------ĉi tie fortranĉu--------------------

P Ř I H L Á Š K A

do pedagogické sekce Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 00 P R A H A 1 - Staré Město

---------------------------------------------------------

Jméno a příjmení: ....................................................

Rod. stav: .............. Datum narození: ..............................


Nejvyšší dokončené vzdělání: ........................................

Zaměstnání - původní: ............ nynější: .......................

Adresa včetně PSČ: ...................................................

Člen ČES od: ............ Číslo legitimace: ...........................
Člen MS v: .............. Člen v dalších sekcích: ....................
Druh pedagogické činnosti: ...........................................

Datum: .......................... Podpis: .............................


VD TVAR Pardubice je monopolním výrobcem sportovních ochranných přileb značka CASSIDA. Tyto přilby obdržíte v prodejnách Domácích potřeb, Drobného zboží a Mototechny.

Zájemcům zašleme požadovaný typ přilby prostřednictvím našich služeb

TVAR VD
Jägermanova 1682
530 03 PARDUBICE

ZLATNÍK

DUV ZLATNÍK OSTRAVA ZHOTOVUJE ZLATÉ ŠPERKY Z MATERIÁLŮ DODANÉHO ZÁKAZNÍKEM. PŘIJĎTE SI VYBRAT Z BOHATÉ KOLEKCE VZORŮ NA NAŠE PRODEJNY UMÍSTĚNÉ V OKRESECH OSTRAVA, OPAVA, FRÝDEK-MÍSTEK, KARVINÁ, NOVÝ JIČÍN, BRUNTÁL A PŘEROV.

PRO POTŘEBY ŠIROKÉ VEŘEJNOSTI VYRÁBÍME ELEKTRICKÁ SAUNOVÁ KAMNA O PŘÍKONU 6 A 9 kW, KUKAČKOVÉ HODINY, VYSOUŠEČE VLASŮ, SKLÁDACÍ TURISTICKÉ LOPATKY, ČESÁČKY OVOCE A PÍŠŤALKY PRO VÝCVIK PSŮ.

VÝROBKY ZASÍLÁME POŠTOU NA DOBÍRKU.

*DRUŽSTVO UMĚLECKÉ VÝROBY,*
*729 12 OSTRAVA 1, Smetanovo nám. 7*

**KDS**

**Sedlčany**

KVALITAJ TRANĈ-PRODUKTOJ

Kuirejaj kaj viandistaj tranĉiloj
ĝardenistaj tondiloj de diversaj tipoj
tondiloj por la kureja prilaboro de kortbirdoj
higiena ilaro - ungo-fajliletoj
- raspiletoj por la malmola haŭto

Fabrikas KDS SEDLČANY ĈSSR
Eksportas MERKURIA Praha




# celostátní servis sovětských foto·kino přístrojů

VÝROBNÍ DRUŽSTVO **MECHANIKA TEPLICE**

MECHANIKA, VD, Teplice, provádí opravy sovětských foto-kino přístrojů a expozimetrů ve svých provozovnách:

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| TEREZÍN | - | **ZÁSILKOVÁ SLUŽBA**<br>Tyršova 211, Terezín | PSČ 411 55 | tel. 92207 |
| LITOMĚŘICE | - | provozovna a sběrna oprav<br>Lidická 5, Litoměřice | PSČ 412 01 | tel. 2004 |
| TEPLICE | - | provozovna a sběrna oprav<br>Vítězná ul., LUNA Teplice | PSČ 415 01 | |
| BRNO | - | provozovna a sběrna oprav<br>Leninova 41A, Brno | PSČ 602 00 | tel.753498 |
| PRAHA | - | provozovna a sběrna oprav<br>Francouzská 34, Praha 2 | PSČ 120 00 | tel.255315 |
| BRATISLAVA | - | provozovna a sběrna oprav<br>Šmeralova 11, Bratislava | PSČ 811 03 | tel.312264 |
| OSTRAVA | - | provozovna a sběrna oprav<br>Gottwaldova 275, Ostrava | PSČ 701 00 | tel. 54691 |



# ESA M 80

# ELEKTRA GLADILMASINO

ESTAS PRAKTIKA HELPANTO POR HEJMO.ĜI OFERTAS VICON DA AVANTAĜOJ
- SIMPLAN PRISERVON
- MAPRIGRANDAN MANIPULADON
- MAL LONGAN TEMPON POR GLADI
- MALALTAN KONSUMON DE ELEKTROENERGIO
- ESTETIKAN FORMON KAJ ALIAJN

TEKNIKAJN DATOJN:

| | |
|---|---|
| ELEKTROKURENTO | 220 V/50 HZ |
| BEZONO DE ENERGIO | 2060 W |
| 2 TERMOSTATOJ | 20-250° C |
| LONGECO | 960 mm |
| LARĜECO | 290 mm |
| ALTECO | 350 mm |
| PEZECO | 28 kg |
| PREZO | 4.340 Kčs. |

PRODUKTAS

**Elektrodružstvo**

**PRAHA 8, KUNDRATKA 17**



# VALNÍKY A ÚČELOVÉ NÁSTAVBY AVIA A21/A31


AVIA N.P. PRAHA 9 • BRNO • IVANČICE • ŽILINA •

| | | |
|---|---|---|
| 14 | Veselin Damjanov kantas en Esperanto /Bulgario/ | 40 min. |
| | Kantoj el Litovio /USSR/ | 20 min. |
| 15 | Tra la mondo /kantas Olivier Tzaut - Francio; popolaj kantoj el la mondo/ | 60 min. |
| 16 | Bulgaraj kaj jugoslavaj kantoj /kantas M. Zdravev, D. Varagić, koruso "Esperanto" ktp./ | 60 min. |
| 17 + 18 | /nur kiel kompleto/: A. Pettyn, Pollando: "Ĉu vi parolas Esperante?" /kurso por komencantoj | 60 + 45 min. |
| | Tri kantoj de Miŝo Zdravev, Bulgario | 15 min. |

---

La unua parto de la fonoteko estis publikigita en la 1-a numero de STARTO, jarkolekto 1984 /sed jam multe pli en "Informoj"/. La kondiĉojn por pruntado alportis la 6-a numero de STARTO, jarkolekto 1983.

M e n d u  k i e l  e b l e  p l e j  v a s t e  ĉ e :
Josef FILIP, Nádražní 146, CS - 768 11 C h r o p y n ě



## ni recenzas

István NEMERE: FEBRO. Romano. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1984. Paĝoj 132, formato 14,5 x 20 cm, kartonita.

La fekunda, originale en Esperanto verkanta aŭtoro, ĝojigas ĉi-foje legantojn per amromano iom detektiveca. Ĝi estas jam lia kvina libro; iuj estis eldonitaj hungarlingve.

Li rakontas mi-forme. La "febro" estas venĝemo, kiu obsedas viron-verkiston post laŭdira memmortigo de lia amatino Anna. Kulpo de ŝia edzo-inĝeniero ne estas trovita ĉe ŝia vivofino, sed la amanto inside persekutas la ankoraŭ nepruvitan murdinton, eĉ uzas intimajn dokumentojn, kiuj povas danĝere suspektigi la edzon. La obsedato decidiĝas fine, mem murdi la inĝenieron, sed lastamomente la afero aliiĝas kaj kiel ĝi finiĝas, ekscias la legantoj, ŝatantaj amromanojn. Nur unufoje oni povas legi iom detale pri enlita sceno.

La tuta historio estas rakontata miksite, mallongaj ĉapitroj el pasinteco miksiĝas kun ĉapitroj el estanteco. Inter la nenumeritaj ĉapitroj estas ĉiam nur kelklinia vaka spaceto, do la 125 paĝoj de la propra libroteksto estas relative dense presitaj.

La lingvo estas bona kaj ekzistas specialaĵoj, el kiuj oni akceptas iujn nur heziteme. Mi mencias almenaŭ la telefonan vokon "alo", kiu laŭ PIV estas "ha-lo" - vd. sub "lo". Preseraroj ankaŭ troveblas, relative malmultaj. La libro estas leginda.

A. Stańura



HISTORIO DE INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-MOVADO.Okaze de la 36-a kongreso de IFEF en Slanĉev Brjag la estraro de IFEF eldonis broŝuron pri la historio de internacia fervojista Esperanto-movado. La titolo estas: IFEF - Historio 1909 / 1984 . Temas do pri 75-jara jubileo. Formato 15x21 cm, 80 p.krom kovrilo kaj aneksaĵo.

La libreto estas belaspekta pro klare legebla literaro sur blanka kreta papero. Ĝi enhavas multajn bildojn, ĉefe fotojn de funkciuloj. La enhavo estas leginda, kvankam ĝi prezentas la historion tre koncize. Oni sciiĝas pri la malfacila, sed entuziasma, senprofitema laboro de la fondintoj, pri la sukcesoj kaj ankaŭ pri obstakloj de tiu ĉi faka movado, pri la pereo de la fruktoj de oferema laboro dum la du mondmilitaĉoj. Sendube la fervojista movado pleje subtenas kaj praktike povus dokumenti la ideojn kaj bezonegon de internacia lingvo. Aferorilate estus eble pritaksi iom nialandan fakmovadon, kiu estas prezentata eĉ pli detale, ol en la "Historio de la E-movado en ĈSR". Domaĝe, ke ĝis nun ne troviĝis kolego, kiu - laŭ akireblaj dokumentoj aŭ almenaŭ personaj rememoroj - estus verkinta pli detalan historion de nialanda fervojista fakmovado.

Gramatike la verko estas senriproĉa, nur kelkaj preseraroj, ekz. la humura "fekprelego" sur p. 47. Iom ne ĉiam ĝusta estas la uzo de kompleksaj verboformoj, resp. la imperfekta rilato de pasiva participo /estis -ata/.

La verkon prilaboris Historia komisiono de IFEF, sed estas klare, ke la ĉefan laboron liveris senlaca kaj entuziasma ano de nia internacia fervojista movado kaj ankaŭ sincera amiko de nialanda IFEF-sekcio, la prezidanto de IFEF k-go Joachim GIESSNER. Li meritas ne nur gratulon, sed ankaŭ dankemon de la fervojista samideanaro, speciale de la nialanda, pro la sukcesa eternigo de la faktoj pri la historio de nia fervojfaka movado.

La libreto ne estas aĉetebla, ĝi estas distribuata senpage al ĉiuj nunaj membroj de IFEF.

/-eto/

Albert LIENHARDT: AMUZA LEGOLIBRO EN ESPERANTO.Eldonis Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1984. Ilustris István Endrödi. 216 p., formato 14 x 20 cm.

La arango de tiu ĉi libro estas nekutima. Jam sur la kvina paĝo oni legas la titolon ANTAŬ-PAROLO, sub ĝi en la teksto: nov-speca, lego-libro, laŭ-eble, tiu-cele ktp. Tiun ĉi uzadon de la ligostreko apogas la aŭtoro per la Plena Gramatiko de Esperanto, 1938, par. 411, "por ke la vortoj estu pli facile ekkoneblaj". Same estas farite en ĉiuj 100 anekdotoj /plej grandparte "infanaj saĝaĵoj"/, inkluzive de la al ĉiu anekdoto aldonitaj ĉirkaŭ 10 demandoj kun respondoj.

Instruanto uzanta tiun ĉi libron devas atentigi la lernantojn, ke la dividitaj vortoj estas specialaĵo, kiun la lernantoj devas ne lerni. La aŭtoro uzas malavare interpunkciajn signojnj, "por montri, kie la legantoj aŭ prelegantoj iomete haltu, por fari mallongan spiropaŭzon." Multaj vortoj estas presataj kursive, por ke oni prononcu ilin pli forte dum voĉa legado. Tio estas afero utila por pli bona ekkompreno de la sen-

co de frazo. Por ĉiuj nomitaj fenomenoj pledas la aŭtoro per siaj didaktikaj spertoj ĉe instruado de Esperanto. Ni fidu al li.

La lingvo estas kontentiga, sed la aŭtoro enkondukas novajn diminutivojn: papiĉjo - paĉjo, p. 44 k. a., maminjo, mamio - panjo, p. 96. Li proponas ankaŭ novajn vortojn: "dekuvri" - malkovri, ekz. Amerikon, p. 32, "polui" /pri malpuraĵoj/ anst. polucii, p. 98, kaj "arbitoro" /ĉe futbalo/ anst.arbitracianto, p. 134. Sur la p. 126 oni klarigas, ke Usono - Unuiĝintaj Ŝtatoj de Nord-Ameriko, sed la ĝusta nomo estas sen "Nord-".

Ĉiu instruanto de Esperanto devas laŭ la karaktero de la Amuza Legolibro, kiel mi ĝin skizis, mem decidiĝi, ĉu li uzos tiun ĉi libron.

A. Stanura

SEPTEMBRA RIBELO 1923 - heroa batalo de la bulgara popolo kontraŭ la faŝismo. Referaĵoj, prezentitaj dum la scienc-praktika konferenco dediĉita al la 60-a datreveno de Septembra Ribelo 1923, okazinta 11. - 12.6.1983 en urbo Stara Zagora. Kunmetis kaj redaktis D. Papazov. Eldonis Urba Estraro de BEA,Sofio 1983, paĝoj 135, formato 20 x 15 cm, ofseta preso, kartonita, prezo Kčs 10,--.

En tiu ĉi verko, konsistanta el kontribuaĵoj de 17 aŭtorojprelegintoj, ni ekscias multajn detalojn pri la heroa ribelo de la popolo kontraŭ la faŝisma puĉo de Cankov, foriginta la demokratie elektitan kamparanan registraron de Aleksander Stambolijski. Ĝi estis la unua ekstersovetia ribelo de kamparanoj kaj laboristoj, kruele frakasita pro nepreparitec o,neorganiziteco. Ni sciigas pri partopreno de progresemaj geesperantistoj en tiu batalo kontraŭ la monarko-faŝisman diktaturon uzurpintan la regpovon la 9-an de junio 1923. Ni legas nomojn kaj sortojn de la viktimoj, de bravaj esperantistoj kaj esperantistinoj kaj versojn pri tiu historia lukto. Emocias nin la sentima pleda parolado de Petko Enev, unu el la gvidintoj, antaŭ la faŝista tribunalo 1924.

Lingve estas la libro bonnivela, kun nemultaj korektindaĵoj, kiel ekz. p. 3/27 "Ĝuste antaŭ 60 jarojn /jaroj/, p. 18/9 .... karakterizis registaron de Cankov kiel faŝista diktaturo /kiel faŝistan diktaturon/, p. 32/2,9 blankgvardeanoj / blankgvardianoj/, p. 32/9 ... de la urbo ĉirkaŭinta /ĉirkaŭita/, p.132/16 kiuj ĉiu homo devas starigi al si mem /kiujn/."

La libro estas valora dokumento kaj certe interesos multajn.

Jiří KOŘÍNEK

# RONDETA VIVO

H A V Í Ř O V

La 17-an de majo 1984 vizitis nin s-ano Drahomír KOČVARA, estro de la porpaca sekcio, kaj tre interese rakontis pri la Tutmonda Asembleo por Paco kaj Vivo, kiun li partoprenis en PRAGO en junio 1983. Li akompanis la paroladon per diapozitivoj, kiuj dokumentis la ardan deziron de ĉiuj partoprenantoj - reprezentantoj de milionoj da homoj - ke ni ĉiuj volas vivi en paco.

La 21-an de junio 1984 okazis pikniko en ĝardeno de la familio PASTRŇÁK en Havířov - Suchá, per kio agrable finiĝis la laborsezono septembro 1983-junio 1984.

ASt.

P R A G O

Dank' al iniciatemo de s-anino Pavla JODASOVÁ ankaŭ ĉijare la pragaj esperantistoj partoprenis la unuamajan manifestacion sur la placo Letná. La verda flago vekis intereson de la ĉeestantoj kaj la esperantistoj estis dufoje salutitaj far ĵurnalistoj pere de laŭtparoliloj.

Laŭ la agadplano de la E-klubo en Prago por la j. 1984 la 18-an de junio estis interkonsentita kunlaboro de la klubo kun la ĉefurba organizo de Ruĝa Kruco.

La 25-an de junio 1984 vizitis la klubon, interese rakontis pri sia lando kaj multajn demandojn respondis la afabla kaj simpatia japana esperantisto, prof. Mizuno Y O - S H I A K I .

Li estas profesoro pri la angla lingvo ĉe la tokia universitato kaj nun li entreprenas unujaran studvojaĝon tra la eŭropaj landoj por konatiĝi kun la lingva situacio de Eŭropo.

-Ku/Št-

"HISTORIO KAJ NUNTEMPO DE ESPERANTO" estas la titolo de laŭtema eksponaĵo de s-ano A. BARTOŠÍK el PRAGO, kiu estis honorita per ORA MEDALO ĉe filatela ekspozicio en BERLINO /GDR/ en novembro 1983. - En septembro 1982 la sama eksponaĵo akiris en BRATISLAVA orumitan medalon kaj materialan premion.

/jm/

V R A C O V

La 4an renkontiĝon de popolaj orkestroj en pola urbo Torun partoprenis orkestroj el Jugoslavio,Svedio, Bulgario,Hungario, ČSSR kaj Pollando. El nia lando alvenis helpe de geesperantistoj de Agrokultura kooperativo" DUKLA" el Vracov kord-cimbala orkestro de Mojmír Vlkojen kun dancgrupo.Ili prezentis tipajn kantojn kaj dancojn de regiono "SLOVÁCKO" Lingvo de la renkontiĝo estis la Esperanto.



H R A N I C E

Unuece klubo de laboruloj en urbo Hranice arangis la 24.5. 1984 publikan kunsidon de la membroj de sia Esperanto-rondeto je la tempo " Esperanto- en la batalo por paco". La kunsidon partoprenis ĉirkaŭ 60 personoj,plejparte junaj homoj, kiuj montris sian intereson pri la interese lingvo kaj ĝia praktika uzo.

## KORESPONDI ✻ DEZIRAS ✻ ANONCOJ

Por ĉiuj 25 vortoj vi pagos 15 Kĉs aŭ 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turniĝu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

VOJCIECH GROCHOWSKI, Wawelberga 3m 185, 01 184 Warszawa. 26-jaraĝa deziras korespondi.

Ingo FISCHER, 18 jaraĝa deziras korespondi kun t.m pri la turismo,naturo kaj ĉiutaga vivo. Adreso: 1156 BERLIN, str. Ho-CHi-Minh 19/B, NDR.Li estas kelnero.

NAKASUJI TERUO, IBO-QUN, MI-TUTYO, IWAMI, 671-13, Japanio deziras korespondi kun junulo el ĈSSR, interŝanĝi fotojn ks.

Miroslava VAŇKOVÁ, 26-jara fraŭlino, Staňkovského 1639, 250 88 ČELÁKOVICE, Ĉeĥoslovakio, serĉas amikinon, int. pri naturo, brodaĵo, interŝ. BK.

Jiří ROKOS,Tolstého 1182/8, 400 03 ÚSTÍ NAD LABEM,Ĉeĥoslovakio, serĉas kongres-stampojn /kovertojn kun stampo aŭ bildkartojn/ el la Esperanto-kongresoj en VARSOVIO /1937/ kaj LONDONO /1938/.

Jana SLÁDKOVÁ, 20-jara virino, Raabova 1588,530 03 PARDUBICE, Ĉeĥoslovakio, dez.kor. pri naturo, faŭno, filmoj kaj dez.interŝ. BK.

Enno TRAUTMANN, 24 - jara, Oberstrasse 69, DDR-5400 SONDERSHAUSEN, dez.kor. kun gejunuloj el Ĉeĥoslovakio.

Marcella KOVÁCS,s-ino, Deák Fu 2, H-4164 BAKONSZEG, Hungario, mezaĝa instruistino, dez. kor. pri literaturo,naturo kaj ĉiutagaj aĵoj.

Wiesław SOKOŁOWSKI,31-jara, ul. Witosa 23 m 43,15-660 BIAŁYSTOK, Pollando, dez.kor. pri literaturo, historio kaj dez. interŝ. BK, E-revuojn, ekslibrisojn.

Suzanne KOVÁCS, s-ino, Deák Fu 2, H-4164 BAKONSZEG, Hungario, mezaĝa instruistino, dez. kor. pri literaturo,naturo kaj ĉiutagaj aĵoj.

Marina MERKULOVA, 20 - jara studentino, ul.Mira,d.39,kv.3, SU-357513 PJATIGORSK,Sovetunio dez.kor.tutmonde pri diversaj temoj. Respondo garantiata.

Nakasuji TERUO, Ibogun mitutyo iwami, 671-13 JAPANIO, dez. kor. kun junulo el CSSR kaj interŝanĝi fotojn.

Vladimír V. ĈARIN, poŝtkesto 941-2, 252141 KIEV 141, UKRAINO-USSR, kolektas E - poŝtmarkojn kaj BK pri pentroarto el ĉiuj landoj.

Galina TICHONOVA, ul.8.Marta d.16, SU-601590 p. VELIKODVORSKIJ /Vladimirskoj obl./ - Sovetunio, dez. kor. kun 16 - 18 jaruloj pri literaturo, muziko, sporto.

Petrunka TARNEVA, 14 - jara lernantino, "VESLEC" 8a, BG - 4400 PAZARĜIK, Bulgario, dez. kor. kun samaĝuloj.

Zdislaw BIELAWSKI, juna instruisto, Plakovice 60c/5, PL-59-600 LWOWEK SLASKI,Pollando, dez.kor. tutmonde pri edukado kaj sporto.

Rože AUKŠTIKALNYTE, 23-jara genetika biologistino, Janonio 27, SU - 235250 PASVALYS, Litovio, Sovetunio, dez.kor.tutmonde pri hundoj, psikologio, genetikaj fakaj problemoj.Respondo garantiata!



## INFORMOJ EL SEKRETARIEJO

### K PŘIPRAVOVANÝM ZMĚNÁM V ORGANIZAČNÍ STRUKTUŘE ČES

V letošním roce dochází ke změnám v právním postavení některých místních skupin /kroužků, klubů/ esperantistů v ČSR. Až dosud existují z právního hlediska místní skupiny /MS/ esperantistů při r ů z n ý c h zařízeních a MS Českého esperantského svazu. V tom je zásadní rozdíl. Pokud MS vyvíjející činnost v rámci různých kulturních zařízení /Osvětové besedy, PKO a j./ mohou tak pokračovat dále a nemusí nic měnit. Jejich právní postavení je tím dáno.

Pokud jsou MS /kroužky, kluby/ ve svazku zařízení ROH /Závodní kluby, Jednotné kluby pracujících ROH /, může dojít od 1. ledna 1985 ke změně na základě Zásad o hospodaření kulturních zařízení ROH, schválených předsednictvem ÚRO, podle nichž nebude se zájmovými skupinami, která mají svá ústředí /celostátní svazy/ v rozpočtech zařízení ROH, uvažováno.Tím se stanou tyto složky v organizaci Závodního klubu činitelem, kterému tam může být nadále povolena činnost na podkladě určité dohody o spolupráci. Tato dohoda ovšem n e n í o p r á v n ě n í m k vyvíjení veřejné /spolkové/ činnosti. Tato musí být zajištěna jiným právním aktem a to tím, že MS se stanou součástí Českého esperantského svazu, tj. MS ČES s právní subjektivitou.

V řadě našich skupin není stále v této věci jasno. Nerozlišují se zatím MS esperantistů při Závodních klubech a MS ČES. V razítkách a záhlaví tiskovin se často uvádějí obě označení dokonce současně.

Tyto Místní skupiny si musí své oprávnění k vyvíjení činnosti od 1. ledna 1985 zajistit do 31. prosince 1984 tím, že požádají Český esperantský svaz o udělení právní subjektivity. Potřebné informace v této záležitosti již ČES všem MS zaslal. /Viz Oběžník Koordinační komise od K. FRANCE ze 30.dubna 1984, včetně 4 příloh/.

Esperantisté v těchto MS ať nečekají na iniciativní postup ze strany svých dosavadních zřizovatelů, kteří z neznalosti nebo z nedostatku času se chovají jakoby se nic nedělo. Změny ke kterým od 1. ledna 1985 dojde, plynou z určitých celostátních opatření a jejich plnění není věcí dobrovolnosti funkcionářů ZK ROH a ani nebude jejich vinou, jestliže esperantisté něco zanedbají. Proto postupujte podle pokynů ČES, resp. jeho koordinační komise, vyjasněte si svoje postavení se zřizovatelem.

Předsednictvo ÚV ČES jmenovalo 28. ledna 1984 Koordinační komisi, jejímž úkolem je zajišťovat hladký průběh přechodu MS na novou organizační strukturu v rámci ČES. Předsedou je Karel

FRANC, Pardubice, členové JUDr. Zdeněk RUSÍN, Teplice, František PÁTERA, Hořice a Ing. Karel JANOUŠ, Ostrava.
K celé problematice proběhlo ještě v září 1984 školení pro funkcionáře svazu.

Resumo: Temas pri ŝanĝoj en organizacia strukturo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio ekde la 1-a januaro 1985.

---



# BOR VÁS VOLÁ



Naše turistické středisko roste. A roste do krásy. Také početná skupina mladých esperantistů a jejich známých obětovala část svého volného času a pracovala. Jednou z nich byla i mladá kreslířka z Č. Budějovic. Podívejte se na titulní stránku. Je ale stále pravdou, že většinu prací dělá skupina lidí podstatně dříve narozená. Jde o iniciativu, odvahu, ale i dřinu a to velikou. V Boru se nepracuje jenom 8 hodin denně, přesto všichni kdož tam až dosud byli mi dají zapravdu, že jsme se rozcházeli s pocitem, že byla odvedena poctivá práce, která bude sloužit všem.

V současné době byly dokončeny a provedeny částečné demolice na stávajícím objektu, který byl dřevěný a ztrouchnivělý, vybetonovány základy nové přístavby, vyzděno přízemí, 1. prvé patro, zhotoveny konstrukce stropů a zabetonovány tyto plochy. Tím je již zároveň hotova příprava na smontování střešní konstrukce a položení střešní krytiny. V měsíci září budou vyzděny příčky v prvém patře a štíty podkroví. Jako všude i my se potýkáme s potížemi získávat potřebný materiál. Musím však říci, že především díky pochopení místních občanů, našich sousedů se i toto daří s úspěchem řešit.

Samozřejmě, že celá dostavba bude ještě vyžadovat hodně práce a to i odborné. Všichni kdož budete moci, zejména v zimních měsících pomoci s elektroinstalací a instalací vody, přihlaste se v sekretariátu svazu. Podaří-li se nám opravdu celý objekt zazimovat budeme pokračovat po celou zimu. Nedejme se odradit těmi, kdož nám nepřejí.



Na fotografiích vidíte stav k 25.8.1984 a původní vzhled objektu. Čekáme na vaše přihlášky. Do Boru však sami nejezděte, nepracuje se tam každý víkend a sami byste těžko mohli co dělat !

Křimský

## LITERÁRNÍ SOUTĚŽ PRO MLADÉ ESPERANTISTY

Sekce mládeže při Severomoravském KV důvěrníků ČES vyhlašuje literární soutěž. Úkolem mladých autorů je zpracovat prózou nebo veršem tato témata:
1/ "PROČ JSEM SE ZAČAL UČIT ESPERANTO?" Toto téma je určeno pro začátečníky a bude psáno česky.
2/ "DÍVÁME SE KOLEM SEBE". Toto téma je určeno pro pokročilé a bude psáno esperantem.

Rozsah textu do dvou stran formátu A4. Pro účastníky budou připraveny věcné odměny. Příspěvky zasílejte do 31. prosince 1984 na adresu: Kroužek ESPERANTO, DK ROH PRAMET, 787 01 ŠUMPERK.

Resumo: Proklamo de la nova literatura konkurso por junaj esperantistoj. Aranĝas kaj detale informos ESPERANTO-RONDETO, 787 01 ŠUMPERK, Ĉeĥoslovakio.

## NAŠE NABÍDKA ESPERANTSKÝCH KNIH, NÁLEPEK A ODZNAKŮ

Knihy:

| | | |
|---|---|---|
| Kanto super lulilo /malgranda slovaka antologio/..... | Kčs | 4,-- |
| Okupacio.................... | " | 8,-- |
| Baza literatura krestomatio.................... | " | 39,-- |
| Timur kaj lia taĉmento.................... | " | 14,-- |
| Estona Soveta poezio.................... | " | 8,-- |
| Trigroŝa romano.................... | " | 45,-- |
| Sileziaj kantoj.................... | " | 11,-- |

Různé:

| | | |
|---|---|---|
| Propisot /50 znaků/.................... | Kčs | 27,-- |
| Nálepky MEM /aršík 12 kusů/.................... | " | 2,-- |
| Nálepky Internacia lingvo /aršík 12 kusů/.......... | " | 2,-- |

Odznaky:

| | | |
|---|---|---|
| Odznak mírový /šestijazyčný/.................... | Kčs | 4,50 |
| Odznak ČSSR.................... | " | 5,-- |
| Odznak hvězdička.................... | " | 4,-- |
| Odznak železničářský.................... | " | 5,-- |

Objednávky zasílejte na adresu: Český esperantský svaz, zásilková služba, Jilská ul. 10, 110 00 PRAHA 1 - Staré Město, ČSSR.

Resumo: Nia oferto de E-libroj, glumarkoj kaj insignoj. Bv. skribi al: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, ekspeda servo, Jilská strato n-ro 10, CS - 110 00 PRAGO 1 - Malnova urbo, Ĉeĥoslovakio.

## EL SOVETIA CENTRA AZIO

revenis meze de aprilo 1984 esperantistoj de KARLOVY VARY. Krom multaj neforgeseblaj travivaĵoj en sino de antikva kulturo ili ankaŭ renkontis lokajn esperantistojn - kaj krom ardaj salutoj ili alportis kelkajn novaĵojn kaj mesaĝojn por ĉeĥa esperantistaro:

URGENĈ,UZBEKISTANO: Komence de januaro 1984 en la urbo URGENĈ laŭ dekreto de la urba komsomola komitato estis fondita E-klubo en kadro de la fervojista oficejo. Aktivuloj de la nova Esperanto-kolektivo deziras starigi leterkontaktojn kun geesperantistoj de la tuta mondo. Viajn leterojn bonvolu sendi al la adreso: ESPERANTO-KLUBO "ESPERO", Ĥasanov Rozumbaj, Do vostrebovanija, SU - 740001 URGENĈ 1, Uzbekistano, USSR. La respondo garantiata.

VERKOJ DE P.POLIŜĈUK SERĈATAJ. Uzbekiaj Esperanto - aktivuloj klopodas ordigi kaj kompletigi por eventuala eldono la krean heredaĵon de vaste konata taŝkenta esperantisto Petro POLIŜĈUK. Tiucele estas serĉataj ĉiuj liaj originalaj kaj tradukitaj verkoj dissemitaj tra Esperanto-gazetaro kaj privataj leteroj. Ni petas la tutmondan esperantistaron kaj ĉiujn leteramikojn de P.POLIŜĈUK reeĥi kaj sendi originalojn aŭ kopiojn de liaj verkoj kaj korespondaĵojn al la adreso de la prizorganto: Vladimir MASALKIN, massiv Junusabad, kvartal 8, dom 13, kv. 28, SU - 700093 TAŜKENT - 93,Uzbekistano,USSR.

ĈIULANDAJ PACPROPAGANDILOJ SERĈATAJ. Samarkanda Esperanto-Klubo de Interpopola Amikeco daŭre kolektas ĉiulandajn kaj ĉiulingvajn porpacajn afiŝojn, flugfoliojn, fotojn, infandesegnaĵojn, librojn, revuojn, ĵurnalojn, lumbildojn, insignojn,gluafiŝetojn, poŝtmarkojn kaj ĉiujn ceterajn pacpropagandilojn. La materialoj estas serĉataj por jam tradiciaj internaciaj porpacaj ekspozicioj. Bonvolu adresi ĉion al:INTERKLUBO "ESPERANTO",SU-703000 SAMARKAND, a.ja.76, Uzbekistano, USSR.

Samarkandaj esperantistoj same petas ricevi diversajn nacilingvajn presmaterialojn /gazet-artikolojn, librojn/ pri sia lando Uzbekistano por konstanta Esperanto - ekspozicio sub titolo "PRI NIA LANDO EN EKSTERLANDO". La materialoj estas atendataj je la supra adreso.

DUŜANBE, Taĝikistano: Du jarojn laboras en la ĉefurbo de Sovetia Taĝikistano DUŜANBE 20-membra esperantista klubo en kadro de la Sindikata Kultura Palaco. Ili jam ankaŭ sukcesis eldoni propran lernolibron de Esperanto. Tre volonte ili korespondus kun la ĉeĥaj esperantistoj. Jen la adresoj: Viktor Ivanoviĉ KISELEV,ul.Razina 5, kv.1, SU-734005 DUŜANBE, Taĝikistano, USSR /klubestro/. - Anna RENSEVIĈ, ul. Mirali 116, kv.19, SU-734000 DUŜANBE, Taĝikistano, USSR / 17-jara/. - Andreo SIDORIN,ul.Navoji 17, SU-734000 DUŜANBE,Taĝikistano, USSR /17-jara/.

Pere de sekretariejo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio ricevis la komisiono por preso kaj informado jenan peton de ukrainiaj esperantistoj el Kiev: En Kieva lernejo n-ro 184 estas preparata la ekspozicio sub titolo "ESPERANTO KAJ MONDO". Ili petas diversajn landajn presmaterialojn en Esperanto /librojn, ĵurnalojn, propagandaĵojn ktp./. La materialojn bv. sendi al la adreso: Oleg VOVKOTRUB, ul.Doneckaja 35, kv.101, SU-252020 KIEV-20,Ukraina SSR.



## LA 9-AJ ESPERANTAJ TAGOJ EN B Y D G O S Z C Z

Laŭ invito de Radio Polonia kaj Esperantotur en Bydgoszcz mi ĉeestis inter la 3-a kaj 10-a de junio 1984 la 9-ajn Esperantajn Tagojn de BYDGOSZCZ. Partoprenis ilin ĉirkaŭ 200 esperantistoj el 18 landoj /ankaŭ el Kanado kaj Irano/. La tagaj programoj enhavis Konferencon pri Monda Turismo, Seminarion pri pacaj temoj,ankaŭ rilate kun la 40-a datreveno de Pola popola respubliko kaj programoj de Radio Polonia.

La vesperoj havis altan artistan nivelon. Precipe la bulgara ĥoro, parte profesia, plue folklora ensemblo el Jugoslavio, sed ankaŭ polaj infanaj grupetoj, kiuj ludis fabelojn, bele kantis kaj dancis.

Dum la trarigardo de la urbo ni oficiale metis florkronon al la monumento de la viktimoj de la okupacio, kaj merkrede ni havis tuttagan ekskurson al la Tri-urbo Gdynia,Sopot kaj Gdansk. Tre impresricaj travivaĵoj.

En la porpaca seminario oni konklude rekomendis uzi en nia agado pli la vortojn "konstrui la pacon kaj eduki por la paco" ol "batali". Oni proponis, ke la venontaj porpacaj seminarioj havu pli konkretan kaj fakan karakteron, kun konkretaj programoj /ekzemple el la sfero de psikologio k.s./.

Tre interesa estis la konferenco pri MONDA TURISMO, kiu montris gravajn sukcesojn precipe per kunlaboro de polaj, bulgaraj kaj hungaraj samideanoj. Estus inde disvolvi tiurilatan aktivecon ankaŭ en nia Asocio, ĉar Monda turismo disponigas tre favorajn kondiĉojn por vojaĝado. Kompreneble ne nur por esperantistoj,sed precipe por la neesperantista publiko. Tiel la uzo de Esperanto en turismo tre efike kontribuas al disvastigado de Esperanto kaj per ĝi al la paca kunvivado de homoj kaj nacioj.

Konklude oni povas diri, ke la 9-aj Esperantaj Tagoj en B Y D G O S Z C Z fariĝis neforgesebla travivaĵo por ĉiuj partoprenintoj.

J. Laube

En la semajno ek de 15/7-22/7 1984 okazis kongreseto de la Kastora klubo en pola urbo Bydgoszcz. Ankaŭ pertoprenis gejunuloj en nombro 20 enoj el Hungario, proksimume 80 poloj kaj unu ĉeĥo. Mi travivis kun infenoj kaj gejunuloj la neforgeseblan semajnon en la ekskursoj, distro ktp. Ĉiuj el partoprenantoj jam atendas la duan kongreseton kaj invitas gejunulojn el ĉeĥoslovakio .

Kopecký.

La 69-an Universalan Kongreson de Esperanto,kiu okazis en Vancouvero,Kanado,de la 21a ĝis la 28a de julio 84 partoprenis 802 homoj el 46 landoj. El ĉi tiu kongreso ni publikos en estonta numero de la Staro kongresan resolucion, kiu temas de la ĉefa konkrese temo " LINGVAJ MINORITATOJ - ĈU NUR NACIA FENOMENO".

Dum la kongreso reprezenten - to de nia asocio transdonis ankaŭ inviton de ČEDOK, ke UEA organizu la UK ankaŭ en ČSSR.

Křimský

"VERDA STACIO" EN ĈEFARTIKOLO!

La radiorevuo ROZHLAS rememoris /n-ro 22/84/ la 60 jarojn de la Radiostacio Brno, kiu funkcias de majo 1924. La ĉefartikolo pritraktas precipe la agadon de D. Chalupa, F. Kožík, J. Bezdíček, K. Höger /ili ĉiuj aktivis ankaŭ en la Esperanto-elsendoj/. "Aparta ĉapitro estis la VERDA STACIO /Zelená stanice/, la regula Esperanto-elsendado", akcentas la verkinto J. Veselý. "Ĝi ne vegetis sur la rando de atentemo, sed ĝuis egan popularecon. Dum vico da jaroj kunlaboris en ĝi kaj recitis en Esperanto ankaŭ la juna Karel Höger" /la posta Nacia Artisto/.

-JM-

FILATELO KAJ ESPERANTO

PRI ESPERANTA FILATELO estas informataj pli kaj pli ofte la legantoj de la gazeto FILATELIE. En la n-ro 6/84 aperis recenzo de s-ano A. BARTOŠÍK /eldonita en GDR kaj presita en Svedlando/ pri Katalogo de Esperanto-poŝtstampoj de Rudolf Burmeister el Karl-Marx-Stadt. En la sama numero estas artikoleto kun reproduktaĵo de poŝtkarto enhavanta belan Esperanto-stampon kun ŠVEJK de la pentristo LADA, per kiu la poŝto Leipzig 1 stampis 15.12.1983 ĉiujn poŝtaĵojn okaze de la Tago de Esperanto-Libro. La poŝtkarto kun la Švejk-stampo memorigis la 100-an naskiĝdatrevenon de Jaroslav HAŠEK.

La eldonon de tiuj interesaj poŝtkarto kaj stampo instigis, krom germanaj amikoj-esperantistoj, ankaŭ la ĉeĥaj kolektantoj Vladimír VÁŇA kaj Adolf BARTOŠÍK, kiuj partoprenis la preparon kaj grafikan aranĝon de la propagand-teksto de tiu PK.

Pri la eldono de k o v e r t o kun Švejk-figuro meritas d-ro Giso BROSCHE.

/FABA/jm/

INTERESA ESPERANTO-KURSO

En naciligva dumonata revuo SUVREMENO VATROGASTVO /moderna estingistaro/ aperas Esperanto-kurso. Enkonduka teksto troviĝas en numero 9-10/1983, kiun sekvas la propra kurso po unu leciono ĉiunumere.

La vorttrezoro de la kurso enhavas ne nur bazan materialon por ĉiutaga konversacio, sed ankaŭ fakajn esprimojn el branĉo de estingado.

La revuo, kies eldonkvanto faras 10 000 ekzemplerojn, estas legata ankaŭ ekster Jugoslavio. Havante pli grandan intereson vi povas skribi al: Vatrogasni savez Hrvatske, Frankopanska 7, YU-41000 ZAGREB aŭ prof. Jozo MAREVIĆ, "Školska knjiga", Masarykova 28, YU-41000 ZAGREB, Jugoslavio.

-pCH-

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská strato 10, 110 00 PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6 foje jare. Responda redaktoro Zdenko KŘIMSKÝ. Grafika aranĝo Milan LABAŠTA. Desegnaĵoj Pavel RAK. Transdonita al presejo la 27-an aŭgusten 1984. Jarabono Kčs 24,--, por eksterlando Kčs 36,-- aŭ 10,50 gld., inkluzive sendkostojn.

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská ul. 10, 110 00 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Odpovědný redaktor Zdenko KŘIMSKÝ. Grafická úprava Milan LABAŠTA. Kresby Pavel RAK. Tisk zajišťuje Technické ústředí knihoven, Praha. Předáno do tisku dne 27. srpna 1984. Roční předplatné Kčs 24,--, pro zahraničí Kčs 36,-- nebo 10,50 guldenů, včetně poštovních výloh. Dohlédací pošta Praha 07. Snížený poplatek za poštovné povolen Ředitelstvím pošt Praha pod č. jedn. P/1 - 1267 ze dne 6. dubna 1979.



Výtvarná řemesla Praha Vám nabízejí široký sortiment bytových doplňků a dárkových a upomínkových předmětů, vyráběných převážně v malých seriích s častou inovací.

Nabízíme:
soustružené mocca soupravy
soustružené odkládací stolky
malované porcelánové soupravy i jednotlivé kusy
malované a broušené vázy, mísy a popelníky
výrobky z cínu
bižuterii kovovou a koženou
a další sortiment z kovu, kůže, koženky, textilu.

V našich prodejnách naleznete vhodné dárky pro každou příležitost. Naše pracovnice Vás ochotně obslouží a pomohou vybrat předmět, který potěší.

Adresy prodejen upomínkových a dárkových předmětů:

| | |
|---|---|
| 110 00 Praha 1, Národní tř. 37 | 22 41 94 |
| 110 00 Praha 1, Vodičkova 28 | 24 47 71 |
| 110 00 Praha 1, Spálená 39 | 29 27 04 |
| 110 00 Praha 1, Na poříčí 35 | 23 17 315 |
| 110 00 Praha 1, Křižovnické nám. 2 | 26 63 28 |
| 120 00 Praha 2, Anglická 18 | 25 98 56 |
| 110 00 Praha 1, Lazarská 5 | 29 83 22 |
| 110 00 Praha 1, Železná 12 | 22 79 14 |
| 170 00 Praha 7, Obránců míru 17 | 37 44 84 |
| 110 00 Praha 1, Můstek – stanice metra | 26 14 19 |
| 360 00 Karlovy Vary, Mariánská 2 | 930/28 381 |

Vzorkovna nábytku:
110 00 Praha 1, Václavské nám. 41 — 26 40 64
přijímá objednávky na individuelní zakázky nábytku a byt. doplňků.

Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10

Noviny

DOHLÉDACÍ POŠTA PRAHA 07,
SNÍŽENÝ POŠTOVNÍ POPLATEK
POVOLEN ŘEDITELSTVÍM POŠT PRAHA
J.ZN. P/1 - 1267/79 ZE DNE 6.4.1979